Laŭlonge de tiu kurso, kaj dum kelkaj pluaj lernojaroj, S. Mulas instruis aron da gelernantojn el tiu urbo, el kiu formiĝis poste la esperantista grupo de Avilés, **ANTAŬEN**, kies unua Prezidanto estis Nicolás Muñiz.

En monato majo de tiu jaro, 1984, la Vicprezidanto de nia E-asocio, Adonis G. Meana, suferis gravan akcidenton. La aŭtobuso per kiu li vojaĝis destine al lia laborejo koliziis kontraŭ alia veturilo. Rezulte de tiu akcidento mortis du personoj kaj multaj aliaj, kiel nia samideano, restis vunditaj. Adonis devis resti dumlonge en hospitalo pro la granda frapo kiun li ricevis surkape. Feliĉe, post kelkaj monatoj HELECO denove povis publikigi liajn kunlaboraĵojn, eĉ se lia resaniĝo ne estis kompleta; de tiam li ne plu revenis al sia laborejo.

En la lerno-jaro 1984-1985 daŭre estis du kursoj de Esperanto en nia asocio. Iun el ili gvidis Santiago Mulas, kiu plue instruadis Esperanton en Avilés, kaj la alian gvidis samideano el Kantabrio, Miguel Gutiérrez Adúriz, kiu tiam estis en nia regiono pro laboraj kialoj. Li parolis al la asturaj esperantistoj en la Zamenhofa festo de 1984 atentigante ilin pri la fakto ke tiu festo-tago estas precipe "la tago de la libro" en nia E-movado. Ankaŭ la tiujara festo estis brila kun la lerta partopreno de kelkaj artistoj.

Denove en tiu vintro funkciis la esperantista stando en la Vintra Foiro de nia urbo. La ĉefa deĵoranto en tiu loko estis samideano Julio Argüelles kiu, cetere, daŭre gvidis E-kurson en iu urba publika lernejo.

Grava esperantista evento de la jaro 1985 en Asturio estis la ŝpruco de Esperanto en la urbo Navia. Tie formiĝis E-rondo kaj estis kurso en kiu partoprenis multaj gelernantoj. Plejparto el ili ricevis la Esperantan diplomon en oficiala kaj solena akto kiu okazis post la ekzamenoj. Partoprenis en tiuj aktoj kelkaj estraranoj de nia E-grupo de Gijón. La aŭtoro de tiu esperantista miraklo en Navia estis S-ro Chapoli.

Somere de 1985 vizitis nian E-grupon kelkaj alilokaj gesamideanoj: geedzoj Luis Hernández kaj Rafaela Urueña el Valladolido, Ramón Manau kaj Luis Serrano el Sabadell, Tarô Nisiumi kaj edzino el Tokio… En la numero de **HELECO** de Septembro-Oktobro de tiu jaro estis publikita artikolo de L. Serrano raportante pri tiu vizito lia al urbo kie li esperantiĝis antaŭ preskaŭ 30 jarojn. Li renkontiĝis kun Alberto Menéndez kun kiu li aktivadis favore al Esperanto en tiu pasinta epoko.

Denove en la vintro 1985-86 nia E-asocio publike propagandis pri Esperanto en stando en la urba Foirejo, kun la ĉefa deĵorado de Julio Argüelles, kiu vendis tie kelkajn E-librojn.

Denove estis la kutimaj du E-kursoj en nia sidejo dum la lernojaro 1985-1986. Gvidis ilin Adonis G. Meana kaj Santiago Mulas. Ankaŭ en iuj urbaj lernejoj estis kursoj de Esperanto gviditaj de Julio Argüelles. Daŭre estis E-kurso en Avilés sed de tiam gvidis ĝin iu el la lernantoj de la antaŭaj kursoj de S. Mulas.

Ankaŭ la esperantista festo de 1985 havis brilan celebradon. Post la kutima flor-ofero en la strato **Esperanto** la gesamideanaro de nia regiono kunsidis en la teatr-salono de la Katedro Jovellanos, kaj post la salutado de la Prezidanto Santiago Mulas estis parolado de Alfredo Villa González, Sekretario de la Gijona urbodomo kaj honora membro de nia Asocio. Li estas filo de nia karmemora Alfredo Villa Villa kaj iam estis prezidinta Hispanan Kongreson de Esperanto en nia urbo. En lia parolado, Alfredo Villa González priskribis la medion kie L. L. Zamenhof iniciatis la internacian lingvon kun la celo ke ĝi konsistigu taŭgan interkomprenilon por la

**I**lustristo de nia HELECO.
**L**i klopodas por ĝia ornam'.
**D**esegnaĵoj de rava beleco,
**E**vidente faritaj kun am',
**F**ruktoj estas de lia laboro,
**O**ferantaj plezuron al ni.
**N**in regalu per tia trezoro
**S**enripoze, mi petas, sinjoro,
**O**rnamante ĉiam pli kaj pli.

**A**ktivo homforma. Jen ĝusta portreto.
**D**e l' viro celata en ĉi akrostiko,
**O**fte babilanta kun gaja rideto…
**N**u, tio ja helpas al lia efiko
**I**nda pri laŭdado de la verda reto.
**S**inceran gratulon, frato kaj amiko!!

**P**ipro kaj sal' de ĉi revuo
**I**nteligente traktas ŝi
**L**onge pri l' Arto de Menuo.
**A**ldonos mi, ke sen enuo
**R**eceptojn ŝiajn legas ni.

Pliaj akrostikoj de Alcibiades